

sub la suda kruco ★
septembro 2017

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIJ

Volumo 25 [3] numero 128 septembro 2017

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Aŭstralio

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero


15-a de novembro 2017

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2016 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Mortaj arboj ĉe Lake Mountain, Viktorio - pro la fajrego en 2009

- 
- 5.** Estas risko prijuĝi aliajn!
 - 8.** Objekto kun historio
 - 9.** Uniformoj
 - 11.** Ekskurso en Indonezio
 - 15.** Ekskurso al la neĝo
 - 19.** Maljuna spekululo en spegulo
 - 21.** Konsultado kaj obeado (Parto 1)
 - 26.** Vizito al Vjetnamio
 - 28.** Vikingaj mitoj
 - 29.** Unuaj Esperanto-kluboj en Aŭstralio

septembro, du mil deksep

Mi spertis pensigan momenton kiam mi preparis ĉi tiun numeron de *Esperanto sub la Suda Kruco* (ESK). Temas pri libera esprimo de opinioj kaj ideoj.

En nia societo, ni ĉiuj havas diversajn opiniojn, sed ŝajnas al mi ke pli kaj pli ofte oni ofendiĝas se iu alia diras ion ajn. En la angla lingvo oni nun uzas la esprimon 'Generation Snowflake' (Generacio Neĝero) por homoj kiuj emas plendi aŭ ofendiĝi pro bagatelaĵoj aŭ alies opinioj. Ekzemple, se iu diras 'Mi ne ŝatas ĉinajn manĝaĵojn', neĝerulo troege reagis: 'Vi ne rajtas diri tion. Ŝajnas ke vi havas grandan problemon. Ŝajnas ke vi ne amas ĉinajn enmigrintojn' ktp ktp.

Do, ni revenu al mia sperto pri ESK. Mi ricevis artikolon en kiu la verkinto kritikis iun gravulon. Laŭ mi, kelkaj el la vortoj estis troige kritikemaj kaj mi sendis mesaĝon al la verkinto por diri ke, kvankam mi ne volas cenzuri, verŝajne kelkaj el niaj legantoj apogas tiun gravulon kaj ofendiĝos pro la tro kritikemaj vortoj. La verkinto decidis ke la artikolo povas ne aperi en ESK.

Poste, mi daŭre pensis pri tio. Ĉu mi faris bonan decidon? Ĉu mi rajtis, kiel redaktisto, malpermesi eldonon de artikolo? Aŭ ĉu mi estas nur unu el tiuj tiel nomataj neĝeruloj? Do, jen demando por nia legantaro: kion vi opinias?

Lastatempe mi uzis Amikumu. Mi ege volas gratuli al Richard Delamore ESK | paĝo 4 | 128 | septembro 2017

kaj liaj kunlaborantoj. Amikumu meritas Nobel-premion ĉar ĝi estas, en mia opinio, la plej utila moderna ilo por esperantistoj. Dank'al Amikumu mi vidas multajn personojn en Nov-Zelando kiuj parolas Esperanton kiuj ne estas konataj al ni. Dank'al Amikumu ni nun havas novajn membrojn de nia loka klubo. Mi ankaŭ vidas ke estas multaj aktivaj esperantistoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando kiujn mi konas kiuj ankoraŭ ne uzas Amikumu. Do, se vi ankoraŭ ne amikumas, mi kuraĝigas vin preni vian poŝtelefonon kaj aliĝi al Amikumu.

Laste, mi kredas ke ĉiam utilas en iu ajn asocio aŭ laborejo transdoni taskojn al novuloj. Nova redaktisto de ESK havos pli bonajn, freŝajn ideojn kaj povos plibonigi ĉi tiun revuon. Tial, kiu volas akcepti ĉi tiun gravan postenon? Mi promesas ke la salajro por nova redaktisto duobliĝos. Kalkulu: al kiom egalas duoble neniom?



Foto de Singapuro kie mi verkis ĉi tiun antaŭparolon reire hejmen al Nov-Zelando post vizito al Vjetnamio

Estas risiko prijuĝi aliajn!

BOB FELBY (ADELAJDO)

Mi scias ke ni ne rajtas prijuĝi unu la alian! Tamen, mi ja tro ofte faras tion. Se ni tiom ofte tion faras, ni ja deprenas unu de la alia la emon ion ajn fari, kaj ankaŭ tio ne estas bona nek rekomendinda!

Tiuj el ni kiuj havas televidilon ofte vidas tie homojn kiuj neniam laboras. Aŭ almenaŭ ili ŝajnigas sin multe tro gravaj por labori. Tiaj homoj estas ja reĝuloj, t.e. membroj de reĝaj familioj, loĝantaj dise en la mondo, kaj aliaj kiuj opinias ke ili meritas same luksan vivon!

Ni, la t.n. ordinaruloj, kiuj faras la t.n. malpuran kaj pezan laboron kontraŭ la plej malgranda elspezo de la riĉuloj aperas publike vestitaj en plej malmultekostaj vestoj. Tiuj “gravuloj” kiuj ne pagas imposton, sed ricevas ĉion, eĉ tion kion ili tute ne bezonas por vivteni sin, tute senpage, ĉiam aperas publike vestitaj per la plej multekostaj vestoj kaj ŝuoj kiujn ili sendube aĉetis kontraŭ multe pli ol nur \$99,99, dum ni, la “malgravuloj” pagas ĉirkaŭ \$3,49 aŭ \$4,99, ĉar ni aĉetas niajn ŝuojn kaj ceterajn vestojn en unu el la multaj vendejoj de la Savarmeo aŭ en similaj brokantejoj.

Ŝajnetas al mi, kaj sendube al la plej multaj el ni ĉiuj, ke tiuj superfluuloj mokas nin. Ili tutcerte bone scias ke ni havas eĉ ne sufiĉe da mono por iri al la dentkuracisto aŭ okulkuracisto, sed tamen ili ĉiam faras sian plejblon por depreni de ni la malmultan monon kiun ni havas. Mi povas imagi ke ili

estas tedaj de sia tro facila vivo kaj esperas trovi amuzon moki la veran popolon!

Tamen, kvankam mi ankoraŭ sentas tion kion mi ĵus priskribis, mi ja ne povas forgesi ke mi ja mem ĉiam rekomendas ke ni neniam prijuĝu iun kaj kiun ajn. Ankaŭ tio gravas, eĉ gravegas! Do, necesas enprofundiĝi en seriozajn pensojn, ĉu ne? Povus ja esti ke tiuj homoj, en unu el siaj multegaj pasintaj enkarniĝoj estis ordinaraj laboristoj, aŭ eĉ pli malbone, senlaboruloj. Mankis do al ili tio plej necesa por saniga kaj feliĉiga vivo. Ili nur tre malbone vestis sin, viroj ne havis sufiĉe da mono por razi sin ĉiutage, kaj virinoj tute ne havis sufiĉe da mono por vizitadi la frizistinon tiom ofte kiom ili vere deziris. Eble tiuj malriĉuloj estis mokataj de la iomete pli riĉaj. Tio okazas, ĉu ne? Sed malgraŭ la mokado, suferado, malsatado, kaj manko de helpo de kuracistoj kaj dentkuracistoj, ili ĉiam estis kiom eble plej feliĉaj kaj helpemaj al aliaj homoj. Post sia elkarniĝo tiuj homoj, do veraj homoj, poste enkarniĝis en reĝajn familiojn. Sendube la Providenco opiniis ke ĝuste tiuj homoj meritas iom longan ferion sur la Tero. Eble pro tio ni ĉiuj nuntempe ridetas, kaj amikeme svingas nian manon kiam ni vidas ilin surstrate, ĉe la bushaltejo aŭ en stacidomoj aŭ kafejoj. Ni salutas ilin kaj donas al ili nian sidlokon en trajnoj kaj aŭtobusoj. Ni ne scias kial

ni tion faras, ni simple sentas amon al niaj proksimuloj, ĉu ne? Ĉu gravas al ni ĉu ili estas reĝuloj aŭ ne? Tiuj “feliĉuloj” ja meritas tion. Ili almenaŭ unu tutan longan vivon suferis pro malsato ktp. Nun ili rikoltas tion kion ili vere meritas. Ni tute ne scias kiom ili suferis. Tio ne koncernas nin. Ni faru nian devon kaj estu helpemaj. Se tiuj kiuj nun ĝuas facilan vivon nenion bonan faras por la malriĉuloj, tiam ili, post sia venonta elkarniĝo kaj iom pli posta reenkarniĝo, ja riskos iĝi malriĉuloj, senlaboruloj, malsanuloj, kaj sendube ankaŭ sendentuloj, ĉu ne?

Troviĝas en preskaŭ ĉiuj malsanulejoj, almenaŭ en Eŭropo kaj Aŭstralio, fako nomata ONG. Tio signifas “Orelo, Nazo, Gorĝo”. Tiuj kiuj suferas pro problemoj orelej, nazaj, kaj gorĝaj devus rajti iri tien por peti helpon por siaj problemoj.

Kaj tion mi ja faris, ĉar mi, laŭ mia propra opinio, severe suferas pro orelproblemoj, ĉar mi surdiĝas, nazproblemoj ĉar mi iĝas ternegemulo, kaj gorĝoproblemoj ĉar doloregas en preskaŭ ĉiuj miaj dentoj. La diversaj kuracistoj en tiu eminenta fako de la malsanulejo estis treege afablaj, kio igis min senti min bone, do ankaŭ mi ridetis kaj agis afable.

La unua kuracisto kuracis miajn orelojn kaj mi elkore dankis, eĉ dankegis lin. La dua kuracisto kuracis mian nazon, kaj mi elkore dankis, eĉ dankegis lin. La tria kuracisto kuracis mian gorĝon, kaj mi elkore dankis, eĉ dankegis lin.

Kelkajn tagojn poste miaj okuloj donis al mi problemojn. Tial, mi iris al la sama malsanulejo por serĉi la

okulfakon. Post kelkhora kurado en ĉiujn direktojn de la granda malsanulejo, mi trovis ĝin. Imaguiton, mi vere trovis ĝin! Iu devas informi nian registaron ke ankoraŭ ne estas sufiĉe malfacile, ĉar malsanulo apartenanta al la laborista klaso sukcesis trovi tion kion li bezonis.

La okulkuracisto kuracis miajn okulojn, kaj mi elkore dankis, eĉ dankegis lin. Kelkajn tagojn poste li donis al mi novajn okulvitrojn por helpi min vidi, precipe por legi la literojn presitajn en la multegaj Esperanto-libroj kiuj troviĝas nuntempe ĉie kaj dise en la tuta, vasta mondo.

Sed jen io okazis. La treege bonkora okulkuracisto kiun mi tiom elkore dankis, eĉ dankegis, nun havis la verŝajne plej grandan problemon de sia vivo. Ial li tute ne sukcesis surmeti sur mian vizaĝon miajn novajn okulvitrojn, ĉar la bonkora orelokuracisto, kiun mi tiom elkore dankis, eĉ dankegis, estis ja fortranĉinta ambaŭ miajn orelojn, verŝajne akcidente, kiam li kuracis miajn orelojn. Kaj ne nur tion. Li ne estas tute freneza. Li diris al mi: “Nun mi pendigas la okulvitrojn sur vian nazon”. Sed ankaŭ tio donis al li problemon ĉar la bonkora nazkuracisto kiun mi tiom elkore dankis, eĉ dankegis, estis ja fortranĉinta mian nazon, verŝajne akcidente, kiam li kuracis mian nazon.

Sed malgraŭ ĉio, kiel vi jam nun scias, mi ja estis decidinta ne plu prijuĝi iun ajn, mi decidis elkore danki, eĉ dankegi lin, kaj mi malfermis mian buŝon montrante al li mian plej

belegan rideton. Sed, ho ve! Kia fiasko, aŭ ĉu vi preferas la vorton "malsukceso"? Tiu mia rideto, per kiu mi intencis feliĉigi la malfeliĉan okulkuraciston, preskaŭ vomigis lin, ĉar la bonkora gorĝokuracisto, kiun mi tiom elkore dankis, eĉ dankegis, estis ja eltirinta ĉiujn miajn dentojn, verŝajne akcidente, kiam li kuracis mian gorĝon.

Do, jen mia konkludo: malgraŭ la fakto ke mi mem emas prijuĝi aliajn,

ni tamen neniam faru tion! Estas tro granda risko! Sed, kiel vi ĵus legis, ĉu ne? Estas ankaŭ risko provi plaĉi anstataŭ aĉi al aliaj homoj! Oni tre facile riskas perdi, se ne sian vizaĝon, do eble siajn orelojn kaj certe sian nazon, kaj kvankam oni espereble retenas siajn okulojn, oni tamen kaj malgraŭ ĉio ne povas facile vidi, ĉar oni havas nenion sur kio oni povas pendigi siajn okulvitrojn!



Objekto kun historio

JONATHAN COOPER (SIDNEJO)



En 2013 mi vojaĝis al Kanado por viziti miajn du filinojn, bofilon, kaj nepinon. Mia pli maljuna filino, Naomi, loĝas en Kanado de post 2005 kaj estas konstanta loĝanto de Kanado ek de 2013 (kaj nun civitano). Tamen, mia pli juna filino, Zoë, loĝis tie per dujara labora vizo kiu postulis ke ŝi eliru kaj revenu antaŭ ol ĝi eksvalidiĝos, por renovigi ĝin por aliaj du jaroj. Anstataŭ vojaĝi longdistance reen al Aŭstralio, ŝi decidis vojaĝi al Usono kaj reveni la saman tagon.

Mi diris ke mi akompanos ŝin. Tial, la 1-an de aŭgusto, ni kune veturis aŭte de ŝia urbeto Kumberlando (Cumberland) dum proksimume tri horoj al Viktorio (Victoria), la ĉefurbo de Brita Kolumbio, kaj trafis grandan

pramon al la malgranda urbo Porto Anĝeleso (Port Angeles) en Usono (vidu la mapon).

Surprize, la doganejo kaj enmigrejeto por Usono ne estis en Porto Anĝeleso, sed en Viktorio. Oni donis al ni formularojn kaj sur unu estis “Nombro da tagoj, dum kiuj vi intencas resti en Usono”. Pro la fakto ke ni estis revenontaj sur la sama pramo je la sama tago, ni ne sciis kion ni devas skribi. Do, ni demandis al funkciulo. Li rimarkis ke ni ne havas valizojn kaj diris (en la angla, kompreneble) “flagpole” (flagstango). Vidante ke ni ne komprenis, li klarigis ke la termino metafore signifas ke oni eliras la ŝipon, piediras al la flagstango, tuŝas ĝin kaj reiras al la ŝipo. (Mi proponas ke la

Esperanta vorto estu “flagstangumi”.) Do, ni skribis la vorton “flagpole” sur niaj formularoj, kaj enpramiĝis.

La vojaĝo, kaj la mezsomera vetero, estis tre plaĉaj. Post 90 minutoj ni atingis nian cellokon. Mi ne memoras ĉu ni vidis flagstangon aŭ ne, sed ne gravis; la esprimo estas nur metafora.

Post tagmanĝo mia filino kaj mi esploris la urbcentron. Ni eltrovis ke ekzistas multaj butikoj de antikvaĵoj. Mia edzino ne vojaĝis kun mi al Kanado (pro sia laboro) kaj pro tio mi pensis ke estos agrable alporti ion por ŝi. Do, mi serĉis ion ne tro pezan kio belaspektos en nia hejmo. Post tri butikoj, mi trovis antikvan latunan kandelington (vidu la bildon).

Ĝi estas memorigo de tipo de kandelingo en infanrimoj, ekzemple “Jack be nimble, Jack be quick. Jack jump over the candlestick.” (Joĉjo viglu, Joĉjo rapidu, Joĉjo saltu super la kandelingo.) Ĝi verŝajne estis kreita dum tempo kiam ne ekzistis elektra lumoj.

Do, tiu objekto ĉiam memorigas min pri speciala tempo kun mia filino.



Dum la kunveno de la Esperanto-Federacio de NSK la 4-an de junio, kelkaj membroj parolis pri objektoj kun persona signifo. Ĉi tiu malgranda artikolo estas bazita sur unu el tiuj paroloj.

Uniformoj

BOB FELBY (ADELAJDO)

Kvankam mi, mian tutan vivon, malamas uniformojn, mi nun, kiam mi estas iomete pli maljuna, ekprovas kompreni ilian uzadon. Tamen, mi devas konfesi ke mi ankoraŭ havas problemojn pri ili. Ĉu povas esti ke uniformitoj sentas sin pli gravaj ol ordinaraj laborantoj? En Danujo kelkaj homoj surmetas uniformojn, sed ne tiom multaj kiom en ekzemple

Aŭstralio. Kial en la mondo lerneĵanoj bezonas uzi uniformojn? Ĉu ili estas pli bonaj ol aliaj homoj? Do eble tio ne estas ĉar ili sentas sin pli bonaj, sed ĉar iliaj superuloj tion postulas, ĉu ne? La kulpo restas do ĉe ili, t.e. iliaj superuloj, la instruistoj. Sed pensinte iom pli profunde mi komprenis ke oni ne povas kulpigi la instruistojn. Ili ricevas siajn ordonojn de la lernejestro,

ĉu ne? Kaj ankaŭ li estas senkulpa ĉar li ricevas siajn ordonojn de la registaro. Nu, do ŝajnas ke la ĉefministro de Aŭstralio estas la kulpulo kvankam sendube li ricevas siajn ordonojn – supozeble nomatajn konsilojn – de iu eĉ pli saĝa ol li!

Tamen, vidante uniformitojn, mi ne povas ne pensi pri murdado kaj detruado, verŝajne ĉar mi plenkreskiĝis dum la germana okupacio de Danujo. Preskaŭ ĉie kien oni iris, oni vidis uniformitojn. Kaj eĉ post la fino de la milito oni vidis uniformitojn. Ekzemple, policistoj surhavas uniformojn, ĉu ne? Kaj buskonduktoroj, poŝtistoj, ambulancoŝoforoj ktp. Multaj homoj surhavas ilin.

Eĉ mi mem surmetis ion tian kiam mi laboris – pardonu “deĵoris” kiel noktogardisto. Sed mi ne estis danĝerulo. Vere, mi volis nur la plej bonan por ĉiuj. Tamen, mi havis miajn principojn. Kiam mi gardis la ĉefbankon de Danujo, oni postulis de mi – vidu, ankaŭ mi havis miajn ordonantojn, miajn konsilantojn – surmeti zonon surhavantan revolveron. Sed mi havis ion kion la plej multaj el ni ankoraŭ ne havis. Mi havis konsiencon. Mi demandis “por kio mi havu revolveron?”. La stulta respondo estis kompreneble: “por mortigi bankrabiston!”. Amuze, ĉu ne? Kompreneble mi neniam mortigos iun ajn. Sed regulo estas regulo, mi aŭ surmetu la zonon kun la mortigilo aŭ iru hejmen kaj neniam plu revenu por servi iun ajn bankon. Mi do surmetis ĝin. Oni diris: “kontrolu ĉu ĝi estas papfreta!”. Mi respondis: “mi eĉ ne tuŝos ĝin, neniam en mia vivo mi tuŝos ESK | paĝo 10 | 128 | septembro 2017

mortigilon, kaj mi ne komencos nun!”. Kaj tiel estis. Mi ne estas mortigema kaj mi ne admiras tiujn kiuj estas tiaj!

Do mia laboro daŭris multajn jarojn kaj ankoraŭ mi havas relative puran konsiencon sed, kompreneble, ne tute puran!

Tempo pasis. Mia vivo ŝanĝiĝis iomete. Mi pensis: “eble uniformoj ne necese estas signo de perfortemo kaj detruado!”. Eĉ la plej Alta Inteligentulo de ĉiuj universoj ja plej verŝajne favoras uniformojn. Li kreis ĉiujn spiritojn, ĉu ne? Ni ĉiuj egalas. Sed ni ne same aspektas. Al iuj el ni tute mankas membroj. Al iuj el ni ili estas anstataŭigitaj per naĝiloj, al aliaj per flugiloj ktp. Iuj el ni, fakte tre multaj, havas kvar kruojn, sed neniujn brakojn. Iuj havas eĉ vostojn, ĉu ne? Kaj ni ĉiuj iomete scias kiel ni mem aspektas. Sed kial la Providenco decidis krei nin ĉiujn tiom diferencaj? Post longa cerbumado mi venis al la konkludo ke tio estas, ĉar ni, kiel lernantoj en la diversaj lernejoj, bezonas lerni en multaj malsamaj klasoj pro la diverseco de la necesaj lecionoj lernendaj! Do, necesas, laŭ la opinio de la plej Alta Inteligentulo, diversaj helpiloj. Tial iuj naskiĝas kun naĝiloj, flugiloj, nur du kruoj, kelkaj kun kvar kruoj, iuj kun kornoj, iuj kun korno eĉ sur la nazo, multaj kun ungegoj longaj, pintaj kaj akraj. Poeto ŝatas nomi tiujn “krifoj”. Fakte, oni povos daŭrigi tiun longan kaj interesan liston sed, ĉar mi, kiel vi sendube jam rimarkis, ne tre ŝatas sidi kaj verki tiajn artikolojn, mi nun ŝatus fini ĝin esperante ke vi estu dankemaj pro la multaj saĝaj informoj en ĝi!

Ekskurso en Indonezio

KAM LEE (HOBARTO)

Matene, grupo de esperantistoj kaj mi partoprenis en unu-taga ekskurso kiu konsistis el vizito al Blanka Kratero (Kawah Putih), Lago Patengan (Situ Patengan), kaj Ranca Upas cervo-parko.

La veturo al Blanka Kratero havis du etapojn. La unua etapo estis veturo per aŭtobuso al turista stacio kiu konsistis el multaj butikoj kaj aŭtomobilrestejo por vizitantoj. Dum la dua etapo, ni veturis per specialaj malgrandaj busetoj kiuj povis porti proksimume ses pasaĝerojn. La vojo estis tre kruta kaj senbituma.

Ni atingis Kawah Putih kiu estas lago en vulkana kratero ĉe 50 km sude de Bandung. Rimarkebla estis la manko de birdoj kaj aliaj bestoj. La lago situas ĉe 2 430 metroj super marnivelo kaj kutime la temperaturo estas 10 gradoj.

Interesa komparo (almenaŭ por ni en Aŭstralio) estas ke la plej alta loko

en ĉeflanda Aŭstralio estas la Monto Kosiusko kiu situas ĉe 2 230 metroj kaj havas dikan neĝon dum la vintro. Pensiga demando estas ĉu estas fizika atesto ke la lago estas neordinara lago? Ni vidis fontojn de sulfuraj fumoj ĉe la rando de la lago.

La lago estas signife acida (pH 0.5-1.3) kaj la koloro de la lago povas esti bluverda al blankverda aŭ bruna (laŭ la koncentriteco de sulfuro kaj temperaturo). Normala laga akvo estas neŭtrala kaj havas pH 7 proksimume. La sablo kaj ĉirkaŭaj rokoj estas blankaj ĉefe pro perkolado de la acida akvo de la lago.

La lago certe ne aspektas kiel ordinara akvujo kaj ĝi estas ĉirkaŭata de krutaj muroj de la kaldero kaj la minimuma alteco estis 40 metroj. Oni povas konkludi ke ni estas en vulkana regiono, sed kio estas la probableco de erupcio? La ebleco estas tre malgranda kaj estas nenia registro de vulkana

Apud la lagbordo. La sablo kaj rokoj estas blankaj pro la puriga efiko de la acida akvo de la lago.

Sur la piedvojo kiu iras al la rando de la lago. Periode, nebulo foriras kaj revenas al la kratero. Buŝkovriloj povas esti uzataj se estas tro da polvo aŭ fumo.





En publika kabaneto ĉe Situ Patengan. Ni sidis en la plej granda kabaneto kiu havas benkon ĉe la flanko de la konstruaĵo. Eble 60 homoj povas sidi tie.



Aliaj esperantistoj en la grupo kaj alia vidpunkto de la lago. Kelkfoje estas bone havi kabanon sen muroj, ĉu ne?

agado en ĉi tiu loko ekde 1600.

Ni piediris laŭ la rando de la lago kaj de tempo al tempo nuboj venis al la lago kaj foriris. Buŝkovriloj estis donitaj al ni, por uzi se estas tro da polvo en la aero, sed ni ne devis uzi ilin. La pejzaĝo estis tre interesa.

Ni revenis al la turista stacio kaj ni butikumis en la malgrandaj butikoj. Ni hazarde renkontis muzikistojn. Ili kantis popularajn indoneziajn kantojn kaj ludis gitarojn. Tio estis interesa kultura travivaĝo.

Poste ni veturis al Situ Patengan kaj laŭ la vojo ni vidis multajn belajn teajn kultivejojn kiuj aspektis kiel grandega labirinto. Situ Patengan estas lago ĉe 1 600 metroj super marnivelo kaj larĝa je 800 metroj. La ĉirkaŭaĵo konsistas el arbaro kaj belaj montetoj.

Ĉe la eniro al la lagoparko estis bazaro kie oni povis aĉeti memoraĵojn kaj manĝaĵojn. Ĉe alia parto de la lagobordo troviĝis multaj bambuaj kabanetoj kiuj taŭgis por pikniki. Bongusta tagmanĝo estis preparita de la organizantoj de la ekskurso.

La plej aventura parto de la



Tagmanĝo apud la lago. Certe estas komforta loko por konversacii kun esperantistoj.



Esperantistoj en motorboato kiu rapide veturas en la lago.



Senmove sur la lago kaj oportuno por reklami la mondan lingvon. Ĝisuk fiere montras la Esperantan flagon. Longe prosperu Esperanto!



Esperantaj salutojn el cigno-aspekta padelboato, aŭ eble ili estas esperantistaj lagpolicistoj kiuj ĉasas nin ĉar ni ne obeis la rapidecan limregulon sur la lago.



Simioj apud la marbordo de la insulo



lagvizito estis veturado sur la lago per padelboatoj en kiuj povas sidi du homoj. Mi kaj Ansuk el Koreio uzis flavan padelboaton en la formo de flava anaso. Ni iris al fora malgranda insulo, kaj la kvietata lago atmosfero en padelboato estis ĝuebla travivaĵo. Estis rimarkinda momento kiam trapasis nin rapida motorboato kiu portis esperantistojn kaj aliajn turistojn. Ni atingis la insulon sed ni restis en la boato, ĉar tiu ne estis taŭga loko por komforte surteriĝi.

Videblaj estis arboj, arbustoj, kaj ankaŭ simio, verŝajne la sola videbla besto sur la insulo. Dum kelkaj minutoj, la mezvigla simio sidis en branĉoj de arbo kaj poste grimpis malsupren kaj sidis sur roko apud la rando de la insulo. Poste la mamulo revenis al branĉoj de arbo. Eble la insulo povas esti nomita Insulo de la Ermita Simio, ĉu ne? Sendube, la simio estas la plej fotita besto en la insulo.

Ni iris al padelboata restejo ĉe la kontraŭa flanko de la lago rilate al la ĉefa boatstacio. Ni surteriĝis ĉe tiu parto de la lago. Ni renkontis kelkajn lokajn Indonezianojn kiuj estis alvenintaj per aŭtomobilo. Ni forlasis tiun belan lokon kaj revenis al la boatstacio por rerenkonti la aliajn esperantistojn.

Ni forlasis la lagparkon kaj veturis 5 km tra teaj kampoj kaj arbaro ĝis kiam ni atingis nian lastan celon kiu estis la Ranca Upas cervo-parko. La parko situas ĉe 50 km sude de Bandung kaj ĝi konsistas el granda kampo ĉirkaŭata de bariero. Je sunsubiro ni vidis proksimume 30 cervojn en granda

grupo.

La bestoj estis brunaj kaj la plej granda cervo havis korpon longan je 1,5 metroj. La plenaĝaj virbestoj havis branĉkornojn. La ĝenerala publiko rajtas nutri la bestojn kaj mi aĉetis malgrandan sakon da karotoj. Mi staris sur levita ligna podio je 1 metro super la tero. Antaŭvidante ke multaj cervoj venos, nur unu besto piediris al mi, malgraŭ la fakto ke proksime troviĝis granda grupo de cervoj. Verŝajne la aliaj estis sufiĉaj sataj.

Ni revenis hejmen post tre bona tageskurso.



Nutrado de la sama cervo. Estas iom strange ke la aliaj ne deziras manĝi karoton.



Ni havis multajn karotojn por la cervoj sed, bedaŭrinde, nur unu besto entuziasmis.

Cervoj ĉe Ranca Upas kiu situas ĉe 50 km sude de Bandung.



Ekskurso al la neĝo

JOANNE JOHNS (MELBURNO)



Ni atingis la pinton de la monto - 1433 metrojn super marnivelo.

Petro, loĝinte en Brisbano dum la plejmulto de sia vivo, neniam vidis neĝon. Mi ne vidis neĝon ekde sesjaraĝa mi vizitis Anglujon kun mia familio. Do, antaŭĝojante novan sperton, ni organizis ekskurson al la neĝo je la fino de julio.

Entute 5 melburnaj esperantistoj venis. Ni veturis de Melburno ĝis Marysville dum horo kaj tri kvaronoj, tra bela kamparo. Ni preterpasis la antaŭan domegon de opera kantistino Damo Nellie Melba, kio aspektis tre luksa. Ni ankaŭ preterpasis lokon kiu nomiĝas "Tramonto" kaj mi ridetis pri la neatendita Esperanto.

Kiam ni atingis Marysville ni iomete butikumis dum ni atendis la buson al Lake Mountain neĝejo. En la butikio estis tre bonvena kameno. Tie oni vendis multajn vintrajn vestaĵojn, inkluzive de koltukoj kaj ŝtrumpetoj faritaj el posuma felo (faritaj en Nov-Zelando kie posumoj estas enkondukitaj bestaĉoj, ne protektitaj bestoj kiel en Aŭstralio).

Ni trafis la malgrandan buson kiu ŝoforis nin dum la lasta duonhoru de nia vojaĝo. Mi supozas, ke estis aliaj homoj en la buso kiuj ne antaŭe vidis neĝon, ĉar kiam ni atingis altecon kie troveblas neĝon ĉe la vojflanko,



Heather, Tristan kaj Peter

eksciitaj voĉoj ĉirkaŭis min.

La pejzaĝo videbla de la buso ankaŭ estis bela, sed en malsimila maniero. En 2009, fajrego okazis en tiu regiono, kio detruis preskaŭ ĉion, kaj pro tio nun restas multaj altaj, blankaj, mortintaj arboj, kaj nur malaltaj verdaĵoj. La aspekto estis tre okulfrapanta, kaj iom perturba.

Kiam ni alvenis ĉe nia celloko ni elbusiĝis kaj spertis la glitan, malmole pakitan neĝon sur la grundo. Tion mi ne multe ŝatis, kaj tre zorgeme promenis, atendante ke mi plej verŝajne baldaŭ falos, malgraŭ tiu zorgeco.

La vetero estis tre bela - sune kaj ne tro malvarme. Antaŭ nelonge estis multe da neĝo, do ni venis je bona tempo.

Ni decidis fari mallongan promenon antaŭ ol kafumi. Estis bona enkonduko al la pli mola speco de neĝo, kaj mi tre infane paŝadis ĉe la



La aventura ŝnuro ne funkciis kiam ni vizitis sed de tie oni povas vidi la ĉefajn konstruaĵojn





Ni faris la kutimajn neĝludadojn: neĝanĝelojn, vizaĝpremojn, neĝulojn (bedaŭrinde tiu bildigita ne estas la nia), kaj ankaŭ skribis en la neĝon por reklami nian plej ŝatatan lingvon!





Mi ĉe la pinto de la monto



Peter kaj mi faras memfoton precize kiam ni estas batitaj de neĝpilkon de Peter W.

flanko de la vojo por sperti la novan senton.

La kontrasto inter la blanka neĝo kaj la verdaj folioj estis tre unika kaj bela, sed ĉiam super ni senmove staris tiuj mortintaj arboj.

Post multekosta tupaŭzo ni iris laŭ pli longa promeno al la pinto

de la monto. Survoje ni multe ludis - ĵetis neĝpilkojn, faris neĝanĝelojn kaj skribis en la neĝo. Unu tre entuziasma membro eĉ faris kelkajn "vizaĝpremojn" en la molan neĝon.

Fine ni atingis la pinton kaj rigardis la belan vidon de tie. Mi trovis la plej molan specon de neĝo kaj multe



Neĝo kaj glacio



Tristan apogas Heather dum la glita promeno



Tristan kuraĝe staras sur roko



Je la fino de nia promeno

ludis per ĝi. La tuta afero estis laŭ mi mirakla kaj mia infaneco regis dum la tuta tago. Petro ankaŭ ĝuis ĝin.

Poste ni revenis al la manĝejo,

malfrue tagmanĝis kaj refoje atendis la buson. Kaj mi tre fieras, ke mi sukcesis trapasi la tagon, sen fali!

Maljuna spekululo en spegulo

BOB FELBY (ADELAJDO)

Maljuna spekululo malsamis iomete al la plej multaj aliaj maljunuloj en la mondo, ĉar, laŭ internaciaj statistikoj, tiuj havas sur siaj maljunaj kapoj preskaŭ neniujn harojn.

Sed tiu ĉi nia spekululo estis, kiel plej multaj aliaj spekululoj en la mondo, iomete, se ne treege, avarega. Io, kio treege maltrankviligis lin estis tio, kial li havas tiom da haroj sur sia kapo, kiam preskaŭ ĉiuj liaj samaĝuloj en la tuta mondo havas preskaŭ neniujn.

Li iris al la hartondisto nur unu fojon dum la jaro, ĉar laŭ sia propra opinio, kaj tiu ja gravis al li, li ankoraŭ ne posedis sufiĉe da mono, kaj tial ne povis viziti la hartondiston ĉiujn kvar semajnojn.

Li do aspektis, sur la supro de sia maljuna kapo, kvazaŭ juna universitata studento, sed la vizaĝo sub la hararo, kiu, cetere, estis ne plu griza, sed blanka, certe aspektis kvazaŭ li pasigis jam cent kvardek ok jarojn sur la Tero.

Do, vivinte jam centkvardek ok jarojn oni plej verŝajne estas almenaŭ iomete pli saĝa, eĉ saĝega, ol universitata studento, ĉu ne? En la kapon de tiu ĉi maljuna spekululo bonŝance venis, laŭ lia propra opinio, eĉ tre bonega ideo. Li pensis: “kial mi mem ne tondu miajn longajn, blankajn harojn?”

Kaj tiel okazis. Li iris al vendejo de hartondiloj kaj – kompreneble kun multaj larmoj en siaj maljunaj okuloj – li pagis iom tro multe, laŭ sia propra opinio, por aĉeti tute novan tondilon kiu cetere estis la plej malmultekosta en la tuta vendejo.

Kun ĝojo en sia maljuna koro pro sia nuna posedo de tondilo, sed ankaŭ kun malĝojo en sia maljuna koro pro la prezo, kiun li konsideris terura, li iris hejmen por komenci sian novan karieron kiel talenta hartondisto.

Ĉio iris glate. Li staris antaŭ iomete granda murspegulo, kiu pendis sur la muro. Subite li ne plu aspektis kiel juna universitata studento, sed pli kiel maljunulo sen multe da haroj sur la supro de sia maljuna kapo. La maljuna spekululo rigardis en la spegulon kaj vidis ke li ankoraŭ ne finis tiun sian unuan majstroverkon. Ŝajnis al li kvazaŭ staras malantaŭ li, en la spegulo, maljuna blanka ĉevalo. Vere estis multege da longaj blankaj haroj malantaŭ la nuko de la maljuna spekululo, kiun li vidis en la spegulo.

Li do provis tondi ankaŭ tiujn longegajn blankajn harojn for de sia nuko, sed preskaŭ vane, ĉar eĉ centkvardekokjaruloj ja ne, almenaŭ laŭ mia scio, havas okulojn en la nuko.

Nu, kion faras saĝa, maljuna

spekululo kun senokula nuko? Nia bona amiko, la maljuna spekululo kun senokula nuko tuj decidis eliri por aĉeti alian spegulon. Li aĉetis, kiel ni povas atendi de maljuna spekululo, spegulon la plej malmultekostan en la vendejo. Kun ĝi li iris hejmen, starigis sin antaŭ la murspegulo, rigardis en ĝin, endekstromanigis sian novan tondilon, enmaldekstromanigis sian novan spegulon, provis teni ĝin malantaŭ sia nuko, kaj komencis tondi la maljunajn, blankajn harojn for de sia maljuna, spekulula senokula nuko.

Sed, ĉiu saĝulo scias ke, kvankam oni tenas tondilon en sia dekstra mano, kaj spegulon en sia maldekstra mano, oni tamen nur tre malfacile povas vidi sian propran nukon. Oni rigardas en la spegulon, ĉu ne? Nia maljuna spekululo faris tion. La spegulo diris al li: “tondu iom pli dekstren!” La maljuna spekululo obeis, sed kiam li komencis tondi tiujn siajn superflujajn harojn blankajn, tio kion li vidis esti dekstra en la spegulo, fakte estis maldekstra ekster la spegulo, do en la reala vivo. Fine li cedis, dirante al si, ke li ja provis, kaj ke neniu povas postuli pli de centkvardekokjarulo.

Sed atendu, estas ankoraŭ pli. Tiu nia bona amiko, la duspegulhava spekululo iris al la hartondisto kiu fortendis de li la plej lastajn harojn, kiujn tiu spekululo ankoraŭ posedis. Kaj fine li aspektis same kiel la plejmultaj aliaj maljunuloj en la mondo.

Do, tiu mia mallonga, sed ege interesa historio, malgraŭ ĉio, havis eĉ tre bonegan finon, ĉu ne?

Konsultado kaj obeado (Parto 1)

PAUL DESAILLY (ADELAJDO)

Eble la plej grava leciono el la kroniko de la religia historio estas la influo kaj la ekzemplo manifestataj de estroj kaj iliaj interpretoj de religia gvidado de kiam la Fondinto estas forpasinta, kaj foje la tre damaĝanta efiko de iliaj silento kaj neglekto!



Nunaj membroj de la Universala Domo de Justeco en Hajfa, Israelo (mallonge: Domanoj)

En Bahaismo nur institucioj havas aŭtoritaton; ĉu bahaaj unuopuloj posedas influon, ĉu celitan aŭ hazardan, estas afero normala plej bone taksata de vi, kara leganto. Rekoni ĉiun iniciaton de nia ĉefa institucio, la Universala Domo de Justeco en Hajfa (mallonge la Domo), ne estas devo absoluta por bahaano. Kaj, neniu tute komprenas ĉiun nuancon nek la tutan amplekson el la klerega plumo de Bahá'u'lláh. Aliflanke, tiom kaj tiel diversaj abundas la spertoj kaj scioj de la anoj de la demokratio elektata Universala Domo de Justeco situanta sur monto* supre de Monto Karmel ke baze nur al Dio tiu Di-protektita institucio

estas respondeca. Postulataj de bahaanoj per nia sankta interligo kun Dio kiam ni libere bahaaniĝas estas agnosko de Bahá'u'lláh kiel la Disendito por nia erao kaj obeado al Liaj instrukcioj kaj institucioj.

Aldone, kaj kerne, gebahaanoj inter si devas interkonsiliĝi en la plena senco por ke veroj manifestiĝu ĉe ni. Rilate al la fundamentaj bahaaj principoj, inkluzive de la lingva principo, mi opinias ke la devo konsulti supozigas eĉ plian gravecon ĉar en tio aperas rimedoj por pacigi la homaron. Bahá'u'lláh: *Por ĉiuj aferoj necesas konsulti. Tion vi forte emfazis, ke ĉiuj plenumu konsultadon. La intenco de tio rivelita de la Skribilo de la Plejaltulo estas ke konsultado estu plene plenumata ĉe la geamikoj pro tio ke ĝi estas kaj ĉiam estos kaŭzo de konsciigo kaj vekigo kaj fonto de bono kaj bonfarto.* (* Jesuo alparolas homamason da kredantoj en la famaj Beatecoj (la Surmonta Parolado); ilin Li nomas la salo de la tero admonante ke via lumo lumu antaŭ homoj por ke ĝi iluminu ĉiujn, kiuj estas **en la domo**. Mateo 5: 1-16: *Vi estas la salo de la tero; sed se la salo sengustiĝis, per kio ĝi estos salita? Ĝi jam taŭgas por nenio, krom por esti elĵetita kaj piedpremita de homoj. Vi estas la lumo de la mondo. Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita. Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur*

ĉiujn, kiuj estas en la domo. Tiel same via lumo lumu antaŭ homoj por ke ili vidu viajn bonajn farojn, kaj gloru vian Patron, kiu estas en la ĉielo. Eble nia Sinjoro kaj Savinto Jesuo Kristo, pensante pri la publika opinio de nia epoko, petegante ĉiujn naŭ virajn estrojn kiel individuojn kaj ilian konsilantaron en apuda Domo situanta sur monteto en Hajfa, bildigis al ni la majusklan 'D' kiun oni perdas en traduko: *donante lumon al ĉiuj en la Domo.* (samloke))

En sia letero de 1986 al ĉiuj eŭropaj bahaanoj (kopie al Aŭstralazio kaj Nord-Ameriko) la Universala Domo de Justeco rekte rekomendas Esperanton kaj opinias ke la eŭropa bahaano devus pligrandigi sian kunlaboron kun la Esperanto-movado. Ni konsilas tiujn bahaanojn, kiuj sentas la impulson helpi en tiu ĉi kadro (tio estas: en la kadro de siaj penoj akceli pacon), lerni Esperanton kaj aktiviĝi en la agadoj de la movado. Kiu, en Bahaaj aŭ Esperantaj rondoj en nia ekstreme afliktata tempo, ne sentas la impulson helpi akceli pacon, mi min demandas. Laŭ la bahaa leĝaro, ĉiuj kredantoj – estroj samkiel ĉe la tuta membraro – senescepte kaj egale akceptu petojn de la primara institucio. Kiam jam dum jardekoj neniu Domano aŭ bahaa konsilisto, nek eĉ unu ĉefa administranto, pozitive reagas al tiu institucia peto de Hajfa, la plejmulto de la kredantoj kompreneble same ignoras tiun leteron kaj la esperantistaro taksas por si mem la valoron de religio.

Obeado estas antaŭkondiĉo de unueco. Profunda kaj travidebla

konsultado nepre necesas antaŭ ol la cetera mondo sin turnu al bahaismo por trovi respondojn al ĉiuj siaj moralaj krizoj kaj etikaj demandoj. Al kiu nia socio turniĝu se ne al Tiu kiun ni konsideras la plej eminenta Instruanto kaj Edukanto de la homaro? La ĉefa motivo kiu iomkoste pelas min postkuri veran konsultadon rilate al la principo de universala helpilo aperis en 1944 en la majstroverko de Shoghi Effendi, *God Passes By* (Dio Preterpasas). ***La konsultadon Li [Bahá'u'lláh] establas kiel unu el la fundamentaj principoj de Sia Kredoj; ĝin priskribas kiel "la lampo de gvidado kiu montras la vojon al kompreno" kaj kiel unu de "la ĝemelaj lumegoj de la ĉielo de Dia saĝeco."*** ... La neceson adopti universalan lingvon kaj skribon Li ripete emfazas; priploras la tempoperdon kaŭzatan de la studado de diversaj lingvoj; konfirmas ke per la adopto de tia lingvo kaj skribo la tuta tero estos konsiderata kiel "unu urbo kaj unu lando"; kaj asertas posedi konon pri ambaŭ kaj esti preta sciigi ĝin al iu ajn petanta ĝin de Li. [En 1890 dum aŭdiencoj kun la Kembriĝa orientalistoj profesoro E. G. Browne, tri jarojn de post Esperanto unue aperis en Varsovio, Bahá'u'lláh en Akko nelonge antaŭ Sia morto referencis verŝajne la Zamenhofan lingvon: *Nuntempe, nova lingvo kaj nova skribo estas elpensitaj. Se vi deziras, Ni ilin komunikos al vi. Estas Nia celo ke ĉiuj homoj firme sin tenos al tio, kio malpliigos nenecesajn laborojn kaj penadon, tiel ke dece estu pasigataj kaj finiĝu iliaj tagoj.*]

Ekzemple, pri fundamenta afero de 'kiam kreiĝas animo?', kristanaj kaj islamaj estroj inter si ne konsentas. Novaj kaj gravaj demandoj venas nun de pli kaj pli da landoj kiuj allasas esploradon pri stamĉeloj por terapiaj celoj kaj limigitan homan klonadon. Grandparte estas tre kapablaj homoj, bone edukitaj kaj altruismaj, kiuj serĉas gvidadon tiukampe. Decidantoj pri etiko en la nuntempa socio – kaj multaj homoj kredas, ke necesas sin turni al ili – bezonas bahaajn sciojn. Krome, malpliigis la nombro da homoj el ĉiuj profesioj konsiliĝantaj kun pastroj, imamoj ks. Pli multnombraj estas hodiaŭ tiuj kiuj serĉas en la scienco respondojn al moralaj demandoj, ekzemple bioetiko. Kelkfoje, eĉ post preĝado, studado, kaj konsultado bahaaj estroj ankoraŭ nek elpensis nek publikigis iujn etikajn klarigojn. Tiam ni unuopaj kredantoj devas honeste kaj simple konfesi nian nescion. Pro sia preteco diskonigi klarajn decidojn pri kompleksaj kaj aktualaj temoj rilatantaj al socia justeco la Unuiga Eklezio populariĝas inter kristanoj kaj spronas la amaskomunikilojn raporti pri ĝiaj vidpunktoj. Tio okazas nun, en tempo, kiam multaj eklezioj daŭre perdas membrojn. Kio okazos kiam ni bahaanoj, provizitaj per la saĝo de la Estro de la Vinberejo por nia erao, skribita de Lia propra mano, levos la voĉon?

Nemalmultajn bahaanojn konfuzas granda elspezo por starigi administradon, monumentajn konstruaĵojn ktp kompare kun

relative magra buĝeto por helpi malriĉulojn. Sistema kaj vasta konsultado montros al ĉiuj racian bazon de tiu ĉi nuntempa politiko. Kaj, neniu adepto de bahaismo scias kial virinoj ne rajtas servi kiel membroj de la Universala Domo de Justeco. Pri tio kontentigos iujn homojn nenio. Tamen, ni bahaanoj obeas ĉar Bahá'u'lláh, la Promesito de ĉiuj popoloj de la mondo, tion por la nuna tempo dekretas. Lia rezonado iĝos finfine kristalklara, laŭ 'Abdu'l-Bahá; honesteco kaj konsultado ĉion malkaŝos. Eĉ se ne plaĉas al ni tiu situacio kaj ni ankoraŭ ne komprenas Lian rezonadon, ni obeas pro tio ke ni agnoskas Liajn saĝon kaj aŭtoritaton. Ni neniel kaŝas ĉi ĉion; male, ni konsultadas ene de la bahaa komunumo kaj ekster ĝi, eĉ se tia konsultado estas malfacila. Ni ne evitas tion, ĉar ni scias ke el la kolizio de diversaj opinioj ekflagras la brila sparketo de la vero. Tiu malfacila konsultado fine allogas serĉantojn al la Fido, ĉar ĝi reliefigas nian bazan kredon je rajtoegaleco de viroj kaj virinoj. Mallonge: konsultado aldonas lumon al lumo, sed la malo kondukas al ver-evitemo, hom-evitemo kaj fine al hipokriteco, t.e. la farisea morto de religio. Vera konsultado malofte okazas en etoso de reciproka flatado, kie ĉiuj grup-pensade konsentas kapjese. Ju pli defia estas konsultado (kompreneble oni observu la etiketon de ĝentileco), des pli magnetosimile ĝi altiras publikan atenton. La bahaa komunumo disponas je la konsiloj en la Skriboj kaj spertoj de siaj anoj,

kiuj ebligas al ni racie pridiskuti pri ĉiu ajn temo, egale kiel tikla ĝi estu.

Post tri jardekoj da aliĝo al la Bahaa Kredo mi ankoraŭ ne komprenas kial tiom malmultaj el miaj samreligianoj ekzamenas ege seriozan averton de Shoghi Effendi verkitan naŭ jarojn post la fino de la Dua Mond-Milito. Malmultaj bahaanoj povas nomi *la ĉefan faktoron rapidigi terurajn afliktojn kaj mondsquantajn krizojn kiuj nepre inkluzivos bruligadon de urboj. Antaŭguston* (emfazo aldonita de mi) *de la detruigo de tiuj mond-ensuĉantaj fajroj, per kiuj la urboj de la nacioj partoprenantaj en tiu ĉi tragika lukto estos pereigitaj, prezentis la Dua Mond-Milito.* En kontrasto kun tiu malvaste konata kaj malprecize priskribita terurego kiun la homaro ne povas eviti sed nur mildigi estas medikamento inda je nia plena konsultado, ĉar ĝi estas laŭ 'Abdu'l-Bahá *la plej granda virto de la epoko, rekomendita de Bahá'u'lláh mem kiel la plej grava instrumento por altigi harmonion kaj civilizacion, kiu, por citi la Universalan Domon de Justeco en sia plej grava letero al la homaro, postulas urĝegan priatenton.* Kio do allogas tiom da superlativoj el neniam ŝanĝeblaj bahaaj skriboj survoje al kaj rekte rilatantaj al (a) realigo de la monda paco (b) harmoniigo de inter si disputantaj religioj (c) instruado de la Kredo mem? Ho mia Dio! Ĉu ekzistas pli gravaj aferoj? Ĉu Shoghi Effendi povus esprimi pli drastan averton? Ni bahaanoj, kiuj ofte gratulas al unu la alia pro niaj supozataj lertoj de konsultado, aprezu ke ĉi supraj tri


superlativoj referencas al nenio alia ol Didonita principo de nia religio, aludita ankaŭ en la Deklaracio de Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj, t.e. la universala help-lingvo.

En parto du de *Konsultado kaj Obeado* mi ekzamenos (a) kiel komuna lingvo *levos la standardon de la unueco de la homaro*, (t.e. slogano de bahaaj verkistoj jam de jardekoj) kaj (b) ke ĉiuj sep milionoj da bahaanoj kiel individuaj kredantoj - malgraŭ la selekto-demando kiu prave ĉe institucioj apartenas - konsideros religia devo neniel evitebla la studon de Esperanto. Mi intencas klarigi kial tiom multaj bahaanoj ankoraŭ restas pri ambaŭ punktoj nekonsciaj. Lastaj recenzoj verkitaj de erudiciuloj de la Movado en Aŭstralio, de volumo titolita *From Babel to Bahá'í* (De Babel-turo ĝis Baha-o), inkluzivas la jenajn akuzojn de la vasta plimulto de bahaaj gvidantoj por malofte engaĝi la lingvo-principon en si mem kaj por elmontri eĉ malplian agadon rilate la zamenhofan lingvon. Marcel Leereveld: *preskaŭ kriminala, kaj almenaŭ politike nedemokratia... tre maljusta.* Trevor Steele: *malfacilas ne akcepti la "ordonon" studi Esperanton.* Vera Payne: *se bahaanoj lernus Esperanton ... memevidentas ke la mondo en netakseblaj manieroj profitos.*

* senpage havebla en Esperanto ĉe la Universitato de Georgio en Usono: http://bahai.uga.edu/Realigas_la_Mondan_Pacon.pdf



Zhou Mack Mafuila



dua trilandia
kongreso de esperanto

SECOND TRINATION ESPERANTO CONGRESS



The international language,
Esperanto:
the simplest language to
learn!

Use it to travel the world, or as
a kick-starter for more difficult
languages. For more information on
events, please visit our website:

aea.esperanto.org.au

- Esperanto classes in two levels
- Theatre and music, concert by Zhou Mack Mafuila
- Esperanto exhibition
- Banquet
- Excursions
- Lectures about Esperanto and other topics

28 Mar - 2 Apr
2018



**SPECIAL
GUEST**

Humphrey Tonkin

Ex-president of TEJO and UEA,
British-American esperantist
Humphrey Tonkin will present
several lectures.

**BEKASI
INDONESIA**

Vizito al Vjetnamio

DAVID RYAN (WELLINGTON)

En julio mi vizitis la urbon Ho Chi Minh en la suda parto de Vjetnamio. Laŭ mia interreta esploro, ŝajnas ke la loĝantaro de la urbo estas inter 7 kaj 20 milionoj. Do, mi ne scias, sed mi certe povas konkludi ke Ho Chi Minh estas grandega urbo kun milionoj da ... motorcikloj! Jes, estas tiom da tiuj bruaj motorcikloj surstrate. Junuloj, maljunuloj, virinoj, viroj – ŝajnas ke ĉiuj posedas motorciklon kaj veturas unuope aŭ eĉ kvarope.

Do, kion fari en Ho Chi Minh? Laŭ mi, la urbo ankoraŭ ne estas tute preta por internacia turismo. Certe estas multaj hoteloj kaj



Katedralo Notre Dame en la urbcentro de Ho Chi Minh – proksimume 7% de la loĝantaro estas romkatolika

granda flughaveno, sed por ni estis malfacile trovi turismajn informojn kaj monŝanĝejojn. Aliflanke, estis vizitindaj lokoj, ekzemple la muzeo pri la milito, la eksa palaco de la eksa Prezidanto de Suda Vjetnamio, bazaroj, longaj tuneloj en regiono apud Ho Chi Minh kie vjetnamanoj kaŝis en bataloj kontraŭ usonanoj ktp. Mi ege rekomendas la muzeon pri la milito. Mi ne sciis multon pri la milito antaŭ nia vizito, sed nun mi lernis multon, kaj estis iomete nekutime kaj strange legi la vidpunkton de lando kiu venkis Usonon, Aŭstralion, Nov-Zelandon ktp. Mi ofte demandis min ĉu la maljunuloj de Ho Chi Minh, kiuj spertis la militon antaŭ pli ol 40 jaroj, sentas sin ankoraŭ en konkerita lando aŭ ĉu ili volonte akceptas la reunuigitan landon kvankam regatan de nordanoj?

Vjetnamio estas malmultekosta kaj maldanĝera lando – mi neniam timis ŝtelon de mia monujo. La vjetnama popolo estas tre afabla kaj helpema. Kiam ni decidis viziti Vjetnamion, ni poste devis decidi ĉu viziti Ho Chi Minh (la plej grandan kaj komercan urbon) aŭ la ĉefurbon, Hanoi. Laŭ mia legado, ŝajnas ke la du urboj estas vizitindaj, sed Ho Chi Minh estas pli moderna. Oni trovas ĉi tie belajn konstruaĵojn laŭ franca stilo flanke kun grandaj, modernaj turoj. Ni certe revizitos Vjetnamion kaj mi rekomendas viziton al ĉi tiu ĉarma lando.



Motorcikloj ĉie



Helikoptero de la usona armeo – unu el la multaj postrestaĵoj ĉe la muzeo pri la milito



Eksta palaco de la eksa Prezidanto de Suda Vjetnamio ĝis 1975 kiam alvenis nord-vjetnama armeo



Moderna urbo



En ĉi tiuj mallarĝaj subteraj tuneloj kaŝis vjetnamaj soldatoj dum la milito

Vikingaj mitoj

TOM O'GRADY (KVINSLANDO)

En la imago de la skandinavianoj dum la meza epoko kreskis granda mitologio. Tamen, kiam oni memoras ke el tiuj landoj venis la vikingoj, tiuj ferocaj mar-rabistoj kiuj estis la teroristoj de eŭropaj marbordoj dum kelkaj jarcentoj, oni ne surpriziĝas pro la kvalito de la fabeloj. En ĉiuj fabeloj okazas murdoj, raboj, perfidoj, seksperfortoj ks; tial, por mi, nur kelkaj ŝajnas rerakontindaj.

Tamen, ni konsideru la fonon de la fabeloj. Mi neniam eĉ pensas provi priskribi la kreadon! Sed, jen skizo de la establita mita universo: en la pra-abismo, *Ginungagap*, estas la naŭ mondoj ligitaj per la branĉoj de la ernoma pra-frakseno, *Jggdrasil*, kiu havas radikon en ĉiu.

Jggdrasil estas priloga de diversaj estuloj: sube, *Nidhog*, drako kiu rongas la radikojn, kaj rongas ĝis *Ragnarok*, la lasta batalo; supre estas *Alegro* kun *Akcipitro* kiu sidas inter ĝiaj okuloj kaj povas vidi kaj raportoj ĉion en la naŭ mondoj; sciuro, *Tatatosk*, kiu kuras supren kaj suben inter *Aglo* kaj *Drako* klaĉante malice, kaj estas kvar cervoj kaj la tri nornoj, diinoj de destino; kaj ... sed sufiĉe!

Ĉiu raso de estuloj vivas en po unu mondo: du rasoj de dioj, homoj, frost-gigantoj, fajr-gigantoj, koboldoj, elfoj ktp. La homoj vivas en *Midgard*, la meza mondo; la ĉefa raso de dioj, la *Aesir*, vivas en *Asgard*, mondo pli alta ol *Midgard*. *Asgard* estas atingebla (por homoj) nur per la dia ponto *Bifrost* (la ĉielarko). La dioj facilanime interbrediĝas kun gigantoj, homoj, kaj foje monstroj.

En *Asgard* estas la grandiozaj

haloj de la dioj. Kelkaj nomoj estas konataj: *Odin*, la reĝo, unuokula, kies trono estas plejeble alta, kaj sidanta sur ĝi kun siaj du mesaĝistaj korakoj kaj du lupoj, li povas vidi ĉion en la naŭ mondoj; *Frigga*, lia ĉefa edzino el tri, kiu ankaŭ rajtas sidi sur ĝi; *Thor*, kun la bumerangaj martelegoj kaj la tuja koleremo; *Frej* kaj *Freja*, gedioj de fekundeco (*Freja* estas diino de sekso); *Tajr*, dio de milito, la plej kuraĝa el ĉiuj; *Aegis*, dio de la maro, kaj lia edzino *Ran*, kiu per reto tiras maristojn el iliaj ŝipoj en la profundon; *Hermod*, kiu bonvenigas mortigitajn heroojn al *Valhalla*; *Ull*, dio de vintro, *Summer*, dio populara kun ĉiuj, krom *Ull*; *Hel*, diino de morto kaj la mortintejo; *Hel*, *Idun*, diino de printempo kaj senfina vivo, donanto de la oraj pomoj de juneco – nur al la dioj; *Heimdal*, filo de *Odin* kaj naŭ gigantinoj samtempe!!, la dio kiu gardas la ponton *Bifrost*, kaj per korno anoncas *Ragnarok*. Per siaj akutaj oreloj li povas aŭdi la kreskadon de lano sur ŝafa dorso!

Ĉu vi trenis vian atenton tra tiu longa listo? Estas multaj aliaj dioj, sed nur du nun menciendaj: *Loki*, dio de malica friponado, kiu finfine iĝas absolute malbona, kaj *Balder*, dio de lumo, bela kaj hela, kies fabelon mi esperas rakonti venontfoje, kaj por kio la supra skizo utilos.

Ne supozu ke mi povas diri nenion laŭdan pri tiuj murdemaj vikingoj! Ili ja estis kuraĝaj kaj fortikaj – ni memoru ke ili vojaĝis en sentegmentaj boatoj ne nur al Britujo kaj la Mediteranea Maro, sed ankaŭ al Rusujo kaj al Nov-Tero en Norda Ameriko, longan tempon antaŭ Kolumbo.

Unuaj Esperanto-kluboj en Aŭstralio

CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)

Esperanto kiel asocio komenciĝis en Aŭstralio en 1903 kiam la Melburna klubo fondiĝis. Tamen, en 1906 vere floris la movado kiam stariĝis grupoj en Brisbano (januaro), Kalgoorlie (junio), Bendigo (julio), kaj Hobarto (oktobro). Klubo en Benalla (Viktorio) sekvis en frua 1907.

En 1908 fondiĝis pluaj kluboj en Adelajdo, en Nova Suda Kimrujo ĉe Tumut ('ĉiela lumo gvidu'), en Gosford kie oni priskribis la klubon kiel "la unuan klubon en Aŭstralio!", kaj en Wolumla (apud Bega) kiu nomis sin "la sola Esperanto-kurso ekzistanta en Aŭstralio!". Oni devas rimarki ke grupoj kunvenis antaŭ ĉi tiuj datoj, antaŭ ol ili iĝis formalaj asocioj.

Nur la kluboj en Brisbano, Melburno, Benalla, Gosford, kaj Adelajdo daŭris ĉar eĉ en ĉi tiuj jaroj ekzistis modelo de granda komenco kun posta disfalo kutime kiam translokiĝis la fervorulo de la grupo. Tia estis la situacio en Kalgoorlie kiam Joseph Skurrie, elstara Esperantisto, translokiĝis al Suda Aŭstralio post ĉeesto de la Universala Kongreso en Nov-Jorko. Eĉ surŝipe li instruis Esperanton! Ankaŭ Charles Lee translokiĝis al Broken Hill. Li estis ĵurnalisto kiu multe eldonis en la Kalgoorlie Western Argus pri Esperanto.

Bendigo disfalis kiam S-ro H. Gwynne Jones iris Eŭropon por



'Kalgoorlie Miner' 14 junio 1906

daŭrigi sian studadon por pastrigi en la Presbiteria eklezio, kaj kiam mortis S-ino Alice Millward, estrino de la Kolegio Gerton (kie kunvenis la klubo).

La Hobarta grupo kripliĝis kiam translokiĝis S-ro Percy Meggie, ĵurnalisto de la Mercury, al Sidnejo, kaj mortis alia entuziasma samideano, H. R. Nicholls, la redaktoro de la Mercury. (Nuntempe la tre ultradekstra 'H. R. Nicholls Societo' memorigas lin). Tamen, en Hobarto loĝis Herman Ritz, profesoro de lingvoj ĉe la Universitato de Tasmanio, la unua Esperantisto en Aŭstralio ĉar li Esperantistiĝis en 1892 kiam li loĝis ĉe Mount Victoria en Blua Montaro. En Tumut la klubo disfalis kiam foriris Pastro Kennedy, kaj la grupo en Wolumla ĉesis kiam S-ro E. C. Bluett devis rapide forlasi la regionon.

Ne ĉio tiel okazis ĉar pluraj kluboj, ĉefe en antaŭurboj, prosperis, sed ofte Esperanto ŝajne progresas kiam io

interrompas la staradon.

Studo de la unuaj jaroj de Esperanto en Aŭstralio montras kvar kategoriojn de homoj kiuj subtenis la universalan lingvon. Estis ĵurnalistoj, alilandanoj kiuj interesiĝis pri lingvoj, komercaj kolegioj kie oni kredis ke Esperanto gravos por komercado kun aliaj landoj, kaj idealistoj.

Komercaj kolegioj kie oni instruis Esperanton troviĝis, inter alie, en Adelajdo: la Kolegio Muirden kaj la Shorthand Business Training Academy de William Hogg. En Perto estis Stott & Co's Business College, kaj en Melburno unue la Komerca Kolegio por Knabinoj de Miss Gearling kaj la Kolegio Dacomb en South Yarra.

En tiuj tagoj oni serioze kredis ke

Esperanto akceptiĝos tra la mondo. Ĉi tiu espero pereis ĉar nacioj asertis ke la nacia lingvo superregos. Tamen, la vera kialo por la nedisvastiĝo de Esperanto en Aŭstralio estas la fakto ke ĝi batalis, kaj oni povas diri ke ĝi ankoraŭ batalas, kontraŭ malamiko. Tiu malamiko de Esperanto en Aŭstralio estas la indiferenteco de la ĝenerala publiko.

El la fruaj Esperanto-asocioj tra Aŭstralio, la Melburna Klubo restis la plej granda. Ĝi supervivis du apartiĝojn: la Komerca Esperanto-Asocio kaj la Ido-Grupo. Antaŭ la unua mondmilito la klubo posedis Esperanto-Halon en Elizabeth-strato kiun ĝi luis al aliaj grupoj.



Melburnaj Esperantistoj piknikas. 'Leader' Melburno, 7 marto 1908.

Anoncoj

Ni gratulas al Benno Lang, relative nova esperantisto de Adelajdo, kiu tre bone sukcesis ĉe la elementa ekzameno (sukceso kun honoro).



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

Chris Krageloh | Secretary

Dave Dewar | Assistant Secretary

David Ryan | Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Joanne Johns, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.